8-a JARO, N-o 391



LEIPZIG, 14. / 7. 1932

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

APERAS dusemajne | REDAKTEJO: 14, av. de Corbéra, Paris 12e. – GVIDANTO: E. Lanti. – SIDEJO DE PLENUM-KOMITATO DE SAT: 23, rue Boyer, Paris 20e. – ADMINISTREJO: R. Lerĥner, Kolmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio). | APERAS dusemajne

RAPORTARO DE LA PLENUM-KOMITATO DE SAT

por la periodo de 1. VII. 1931 ĝis 30. VI. 1932.

A) RAPORTO DE LA DIREKCIO.

Niaj mortintoj. Ni estas informitaj pri la morto de jenaj Gek-doj: *Tiĥon Golovin* el Sovetio (ĝis sia morto aktiva SAT-ano), polia studento *J. K.*, kiu memmortigis sin, *Marta Boxhammer*, Dresdeno, modele aktiva SAT-anino, K-do *V. Juŝkeviĉ*, fervora membro el Sovetio. Laborante plue kun fervoro por nia organizo, ni honoras plej laŭcele la memoron de tiuj Gekdoj!

Konsisto de Direkcio k P. K. (Plenum-Komitato). Laŭ propra propono de la P. K. ĉe la XI-a Kongreso ni aranĝis kiel eble plej frue post la Kongreso *referendumon* pri fido aŭ malfido al la nuna P.K. k speciale al K-do Lanti, pro la malnoblaj atakoj direktitaj ĉefe kontraŭ tiu K-do. La rezulto de tiu referendumo (publikigita en la n-o 376/77 de „S-ulo“) estis klara esprimo de aprobo k fido (877 voĉoj por, 171 kontraŭ, ĉe 1071 voĉdonintoj el 2045 aktivaj membroj).

Dum la raportjaro eksiĝis pro troa okupiteco unuflanke, forloĝiĝo aliflanke el la Direkcio K-doj *Aber* k *Marso*, kiujn anstataŭis K-doj *Devaren* k *Bartelmes*, laŭorde elektitaj en kunveno de la Pariza SAT-anaro (22. febr. 1932). K-do *Stej* (Bournemouth) eksiĝis aliflanke el la P. K. deklarante en sia letero de la 23. 5. 32, ke li trovas necese fordoni ĉian aktivan partoprenon en la politika k esp-a movado pro profesia studado.

La Direkcio kunvenis regule ĉiudusemajne k faris siajn decidojn preskaŭ ĉiam unuanime. Gravajn decidojn ni submetis antaŭe al la prijuĝo de la ceteraj anoj de la P. K., sen kies principa aprobo nenia grava paŝo estis farata.

Rilatoj kun Ĝ. K.-aro (Ĝen. Konsilantaro), K. K. (Kontrol - Komitato), Statutkomisiono k Literatura Sekcio. En febr. 1932 ni informis la Ĝ.K.-aron pri nia agado; al tiu cirkulero respondis nur 2 anoj el la malmultaj, kiuj restis post la foriĝo de l'sovetianoj, kiuj lastaj prezentis grandan elcenton el la malnova instanco. La situacio de l'Ĝ. K.-aro estos debat-objekto dum la pritrakto de l'Statutkomisionaj proponoj.

Niaj rilatoj kun la Kontrol-Komitato, — kies elekto estis validigita definitive per referendumo la 5. XII. 31, post kompletigo per tria ano en kunveno de Bruselaj SAT-anoj de 10. 9. 31, estis normalaj. Pri ĝiaj kunvenoj ni ricevis protokolon.

Kun K-do *de Bruin*, kiu sekretariis por la en la lasta kongreso elektita *Statutkomisiono*, ni havis dum la lastaj monatoj ampleksan korespondadon k opini-interŝanĝon rilate la malfacilan ellaboron de nova Asocia Statuto. Necesas rimarkigi, ke K-do *de Bruin* anstataŭis, laŭ nia peto, en tiu laboro K-don *Platiel*, kiu estis elektita kiel sekretario en Amsterdamo, sed kiu ne povis plenumi sian taskon pro forvojaĝo. Pro tio okazis prokrasto en la pretigo de la teksto.

Kun la sekretario de la *Literatura Sekcio*, por kies starigo ni alvokis en la n-o 378/79 de „S-ulo“, K-do Baranyai, ni ankaŭ restis en daŭra kontakto. La malfaciloj en la vigligo de tiu fako estas esence financaj.

Rilatoj kun Administracia Komisiono. Ŝparplano. La reorganizado de l'financa plano estis la plej urĝa laboro, kiun ni entreprenis sur la bazo de la proponoj de la Adm. Kom., tuj kiam ni sciis pri la rezulto de la referendumo. Por efike ekvilibrigi la buĝeton, ni decidis pri provizora dusemajnigo de *Sennaciulo* (decido aplikita ekde oktobro; kun malaltigo de l'abonprezo ekde januaro); ni decidis pri ŝparoj en la administra aparato: provizora maldungo de K-do *H. Platiel*, konfirmita komence de septembro; mallongigo de l'labortempo kun konforma salajra redukto por la ceteraj oficistoj en la Administrejo, k ankaŭ por K-do *Bartelmes* en la Redaktejo. En junio 1932 estas decidite, interkonsente kun la Admin. Kom., ke K-do *Lerĥner* sola faru la admin. laboron dum la someraj monatoj. Bonvolan, senpagan helpon li ricevos de Lajpcigaj K-doj por la ekspedo de la gazeto k eventuale en okazo de neceso.

Tiu ŝparado estis tiom pli necesega, ke post ŝanĝo de la presejo de „S-ulo“ en aŭgusto 1931, la ĝisnuna „laborista“ presejo „Neudrag“ rifuzis ĉiun pagprokraston rilate la ŝuldon de 3500 mk.germ. k eĉ komencis proceson (komence de oktobro) por pagigi al si *per unu fojo* la ŝuldsumon. Por eviti la altajn proceskostojn, ni klopodis urĝe pri kolektado de la bezonata sumo k sukcesis en niaj klopodoj, ricevante monon *prunte* per la interveno de kelkaj K-doj.

Ni klopodis ankaŭ pri malkara presejo, k tiurilate turnis nin al K-doj en Aŭstrio k Hungario, sed fine devis konstati, ke la oferto de nia nuna pres-

ejo de „S-ulo“, O. Vetig en Gelnhausen, estas la plej kontentiga rilate la gazeton – post kiam ĉi tiu firmo ankoraŭ cedis rilate la prezon (kvankam la cedo ne atingas la aŭstrian oferton). Ĉefe malakceptinda estis la postulo de la aŭstria presejo, pri unujara kontrakto, pri kiu ni malkonsentis pro evtl. inflacio. Krome la pagokondiĉoj ĉe Vetig estas favoraj k ekspedo el Aŭstrio de la gazeto malsimpligus la kontrolon. Pri libropresado ni tamen eluzis oferton el Aŭstrio, sed ne estis kontentigataj rilate la liveradon de l' presaĵo. Unue la presejo mem prokrastis longe la liveradon, k due la doganaj ĉikanoj estis aparte tedegaj: nia administra sekretario, K-do Banmer, perdis multajn horojn, sin okupante pri tiuj prodoganaj formalaĵoj. La pli k pli grandiĝantaj baroj en la internaciaj rilatoj signifas krome financan malprofiton por la Asocio, ĉar tiaj neantaŭviditaj ekstraj elspezoj ne estis enkalkulitaj ĉe la fikso de la prezoj por niaj eldonaĵoj.

Ankaŭ ni devas mencii ĉi tie la tielnomatan „libromonaton“ (aranĝitan en novembro), dum kiu ni speciale malkare ofertis niajn eldonaĵojn por senprokraste ricevi iom da kontanta mono en la kason.

Laŭ instigo de K-do Veder, vickonsilanto, ni pritraktis la eblojn de translokigo de la Administrejo el Lajpcigo al Parizo, pro la pli k pli minacanta faŝisma danĝero en Germanio. La Lajpcigaj Admin.-Komisionanoj tamen en sia kunsido de 27. I. 32 esprimis sin optimiste rilate al la situacio k en letero de 19. 3. 32 konigis, ke ili transprenas la garantion pri sekurigo de la havaĵo en okazo de danĝero.

La Breĉo. Por forigi la deficiton estigitan per la rabo de la CK SEU, k por ke la ŝarĝo ne nur restu sur la ŝultroj de kelkaj malmultaj K-doj, pruntintaj grandajn sumojn por savi SAT de bankroto, ni ĉe la komenco de la efektivigo de l'ŝparplano alvokis por kolekto de monsumoj, kie ajn la eblo prezentiĝas, por „ŝtopi la breĉon“. La rezulto de tiu kolektado estis ĝis la 15. VI. 32 proks. **1100 mk. g.**, sumo – kvankam nesufiĉa ankoraŭ, tamen atentinda, ĉar amasigita el multaj malgrandaj donacoj, en tempo speciale malfavora k peniga por la proletoj.

Oni devas scii, ke eĉ la neŭtrala U.E.A., kiu havas k ĉiam havis pli altan membronombron ol nia Asocio k pli altajn membrokotizojn, krome disponas pri garantia kapitalo el heredaĵo de Hodler, k kiu ne spertis rabon kiel SAT, estis devigata en ĉi tiu jaro alvoki por monhelpo. La paĝaro de ĝia nur monate aperanta organo konsiderinde malpliampleksiĝis. Laŭ diroj de l'centra kasisto la monhelpoj ricevataj servas entute por kovri la perdon kaŭzatan dum 1932 el la falo de la monkurzoj. Ĉi-okaze ni petas interesiĝantojn, ke ili komparu la kostojn por la mastrumado de UEA kun tiuj de SAT.

Jarlibro. Informilo por aspirantaj membroj. Ni sukcesis aperigi la Jarlibron en komenco de aprilo. Ĉar en 1931 ne aperis Jarlibro, ni decidis publikigi en ĝi ne nur la adresojn de tiuj, kiuj pagis almenaŭ la unuan duonon de la kotizo por 1932, sed ankaŭ de tiuj, kiuj pagis la *tutan* jaron 1931 k ne estis eksigitaj aŭ mem eksiĝintaj el la Asocio.

Cedante al deziresprimo de diversaj aspirantaj membroj, ni eldonis komence de majo la unuan n-on de *informilo* por la aspirantaj membroj, kun la celo konigi al ĉi lastaj, kiuj ne ricevas „S-ulo“-n, la ĉefajn okazojn en la organizo. Tiu eldono ciklostilita estas projektita kiel trifoje jare aperanta; sekve la dua n-o aperos en septembro k informos la aspirantajn membrojn pri la rezultoj de la Kongreso. Certe tiu aranĝo iom kompensas fervorajn K-dojn, kiuj pro aparte malfavoraj cirkonstancoj nuntempe ne povas legi „S-ulo“-n.

Ŝtutgart en la Historio:

Kamparana ribelo en la Ŝvaba lando.[1]

Dum Ev' laboradis k Adam', kirielejs,
Nobel' kie estis do tiam? kirielejs.
Al atak', el bivak',
Ruĝan kokon metu ĉe l' monak'.

Depost jarmiloj homoj vivas en mizero k malbonstato, k depost jarmiloj la mizeruloj estas devigataj, batali por povi vivi. Malbonege estas, ke la tajloro ne havas vestaĵojn, la ŝuisto ne taŭgajn ŝuojn. Sed plej bedaŭrinde estas, se la kamparano, per kies laboro vivas la burĝo, proleto, pastraĉo, soldato k imperiestro, mem ne posedas sufiĉe da nutraĵoj. Se lando konsistas preskaŭ nur el kamparanoj, kiuj estas turmentataj k ekspluatataj ĝissange de grupoj da facilanimaj korteganoj, tiam ve al tia lando!

La malriĉuloj estas malpostulemaj, ili ne volas palacojn k nenian lukson, sed ili volas vivi dece. Por la homa liber-batalo ekzistis dum ĉiuj tempoj nur la celo, ebligi al ĉiu homo laŭ sia estado kiel homo vivon homindan. La celo estas la sama, nur la bataldevizoj varias ĉiam laŭ la historia periodo. Hodiaŭ laboristoj k kamparanoj batalas por la posedo de l'produktiloj, por la socialismo, k antaŭ 500 jaroj



la germanaj kamparanoj batalis sub la standardo de l'kruco „por la liberiĝo de la kristana homo“. Netolerebla estis la ekspluatado fare de la nobelaro k klerikularo. Multegajn sumojn postulis la brila, pompa kortega vivo de l'diboĉa duko Ulriko fon Virtembergo. En la libro de d-ro V. Cimerman (Zimmermann) „La granda germana kamparan-ribelo“ ni povas legi:

„Ĉiujn elspezojn la popolo devis porti sola. La kortegservantojn, forstmastrojn k forst-servantojn liberigis la duko de impostoj k devigaj servoj spite malnova tradicio k kontrakto, k krom tio la popolo estis fitraktata ĉiutage per atakoj al sia honoro k propraĵo. Per ĉevaloj k hundoj la dungitoj k ĉasistoj invadis la kampojn k vinberejojn de l'burĝo k de l'kamparano, kiuj jam suferis pro la sennombraj ĉasbestoj, precipe la aproj. La vinkulturisto, kies vinberejo dum la aŭtuno estis difektita de la birdoj, estis punata senindulge, senkompate, se li kaptis birdon aŭ mortpafis malutilan ĉasbeston. En la arbaro, sur la paŝtejo k en la fiŝakvo de la komunumoj oni prenis iom post iom iliajn malnovajn rajtojn, k princaj servistoj k korteganoj alproprigis al si mem la rajton, kiu apartenis al la komunumoj. En la komunumajn administraciojn, kiujn rajtis okupi komunumanoj mem, la korteganoj aŭ la plej superaj kanceliaristoj, ignorante la proteston, nomis siajn servantojn aŭ tiajn, kiuj pagis al ili por tio. La dukaj oficistoj konsideris siajn funkciojn sole kiel profitfonton. Ili ne nur estis subaĉeteblaj, sed postulis eĉ donacojn; ili estis malkleraj k netaŭgaj, sed elpensemaj por novaj turmentoj, por elpremi por si mem monon. Ili estis senhontaj k regaĉemaj, malhumilaj k kruelaj kontraŭ la popolo.“

Post 14-jara regtempo la lando de l'duko Ulriko estis elsuĉita k krom tio ĝi havis ŝuldojn, la unikan sumon de unu miliono da guldenoj. Oni ŝanĝis

[1] Ĉefurbo estas Ŝtutgart.

La kontakto kun sovetianoj restis malfacile efektivigebla, k la plej severa kontrolo fare de la cenzuro preskaŭ malebligis niajn klopodojn resti en konstantaj rilatoj kun eĉ malmultaj K-doj el tiu lando. Ni tamen iel sukcesis, laŭ sufiĉe elspeziga maniero, konservi ian interligon, ne sen oferoj cetere de la flanko de la sovetiaj K-doj, kontraŭ kiujn, ĉe malkovro de la rilatoj, CK SEU per kalumnioj k denuncoj senkompate elpaŝis. Tiel, ekz., estis publikigitaj faksimiloj de SAT-membrokarto k leterkovertoj en la ruslingva organo de SEU por denunci K-dojn, kiuj deziras teni fidelon al SAT, k ili estis devigataj deklari publike sian malsolidariĝon kun ni, por ne ricevi „lupan pasporton“, kiel unu el ili sin esprimis.

Malgraŭ ĉio, ni estas bone informataj, ke en normalaj cirkonstancoj la plimulto da K-doj en Sovetio estus kun ni. Tion cetere bone konscias CK. de SEU mem, kiu dediĉas multajn paĝojn en siaj eldonaĵoj por kalumnii nian organizon k tiel provi erarigi niajn fidelajn amikojn, kiuj ne povas aŭdi nian voĉon.

La Nova Epoko. Reaperigi tiun ĉi eldonaĵon kiel memstaran revuon estis k restas esence nia celado; ni ne sukcesis en tio ĉi-jare, pro la krizo k sekva nericevo de sufiĉa monsubvencio k abonantaro. Ni tamen menciu ĉi tie aparte la oferemon de nia presisto Vetig, kiu garantiis la necesan sumon por la unua kajero, k de la Stokholmaj SAT-anoj, kiuj garantiis simile por la dua. En marto ni definitive decidis pri la reaperigo k apermaniero de la revuo: dumonata ĝi estas, anstataŭ unu n-o de „S-ulo“ ĝi aperas, k estas liverata al ĉiuj „S-ulo“-abonantoj senescepte, en amplekso de almenaŭ 20 paĝoj. Komence de aprilo aperis la unua kajero, en junio la dua. Nia espero estas akiri per la eldono de belaspektaj kajeroj sufiĉan kvanton da *novaj* abonantoj por garantii la daŭran aperon k poste eĉ ĝian aperigon kiel memstaran revuon. Per tio, ke ni alvokis al aparta abonado al la revuo eĉ de „S-ulo“-legantoj, ni havis la eblon senpage disponigi kelkajn ekz-ojn al mizerstataj K-doj.

Libro-eldonado. Ĉar la flua disvendo de libroj sole garantias sanan financan bazon al la Asocio, ni pli ol iam en tiu ĉi krizjaro zorgis pri tio aperigi nur verkojn facile disvendeblajn k cetere ankaŭ vere bezonatajn. Tiel ni presigis, anstataŭ reeldoni la antaŭan „Ni Legu“, novan „Unua Legolibro“ prilaboritan de K-do Bartelmes, la redaktoro de „S-ulo“. Plie aperis nova eldono de PETRO, duoble pli ampleksa ol la antaŭa, kun multaj bildoj ktp., ankaŭ prilaborita de K-do Bartelmes. Aperis ankaŭ, bedaŭrinde tre prokraste, pro la nefidindo de la presisto, la „Protokolaro pri la XI-a SAT-Kongreso“, tre ampleksa broŝuro kun dokumenta valoro. Du libretoj en la kadro de „Biblioteko de Sennaciulo“ estas en preparo, unu prilingva k unu socipolitika, kiuj, parte pro financaj, parte pro teknikaj kaŭzoj, ankoraŭ ne pretiĝis.

La dua eldono de la *Plena Vortaro* estas necesiĝinta; teknike la laboro estas preskaŭ finita; la verko havos tute novan konsiston k evidentaj mankoj en la unua eldono estos forigitaj en la dua. Sed la kapitalo por la reeldono mankas al ni: la tuta profito el la unua eldono efektive estas foruzita por ŝtopi alilokajn deficitojn en la aparato de la organizo. Tamen la pruntoj faritaj por eviti bankroton, estas nur one repagitaj. Ne ekzistas alia eblo, ol per pruntoj aŭ antaŭpagoj certigi la aperon de la dua eldono.

Bilanco de l'XI-a, preparo de l' XII-a Kongreso. La bilanco de l'Amsterdama Kongreso elmontris kreditsaldon, kiu estis sufiĉe granda, por ke ni povu decidi pri broŝura eldono de la *Protokolaro* pri tiu Kongreso. Tiu

---

la mezurilojn k pezilojn. Per tio la popolo devis porti novajn nerektajn ŝarĝojn.

Jam delonge la popolo murmuris. Rifuĝintoj el la najbaraj regionoj, en kiuj jam estis venkitaj kamparan-ribeloj, agitis kiel spertaj propagandistoj. La premo k la devigo, sub kiuj la kamparanoj estis tenataj, devigis ilin agi sekrete. En burleskokluboj la kamparanoj organiziĝis. Ili elektis kapitanojn, kiuj devigis ĉiun novaliĝinton per manfrapo k disdonis al ili siajn partojn „sur la Luno“, „sur la Netaŭga Grundo“, „en Nenie-hejmo“ k „sur la Malsatdeklivo“.

Dum pasko en la jaro 1514 la kamparanoj el Beŭtelsbaĥ en la Rems-valo marŝis kun sia estro „Gejspeter“ al la rivereto Rems, por tie aranĝi per novaj peziloj la „akvoprovon“.

„Se naĝos la peziloj,
tiam pravas la duko,
sed se ili dronos,
la kamparanoj pravas!“

Sub la gvidado de la jam en la jaro 1503 fondita sekreta unuiĝo „La malriĉa Konrado“ kolektiĝis nun la kamparanoj, konkeris la pli malgrandajn urbojn k fine formis du grandajn rotojn da kamparanoj, la unuan sur la Kapel (Kappel)-monto apud Ŝtutgart k la alian sur la „Anĝelmonto“ apud Leonberg, kiu situas proksimume tri horojn distance de Ŝtutgart. Per hazardo la okupo de Ŝtutgart estis malhelpita. La ĉefa sidejo de l'ribelo estis la Rems-valo.

Kaj nun la kamparanoj eraris same, kiel la plej multaj ribelantoj: anstataŭ agi, ili intertraktis. Per intrigoj k subaĉetoj la traktuloj sukcesis, igi ŝancelaj la kamparanojn. Oni promesis per la kontrakto de Tibingen al la kamparanoj senpunecon k liberan iradon. Tial la ribelintoj disiĝis k iris hejmen. Tiom pli ili estis konsternitaj, kiam subite la de la reganta duko dungitaj helptrupoj el la urboj, el Palatinato, el Badeno, same kiel el la klerikalaj posedaĵoj Konstanco k Vircburgo atakis ilin k okazigis teruran buĉadon.

Per glavo k torturo la duko „plenumis“ la kontrakton de Tibingen, por pruvi al la kamparanoj, kiu estas la sinjora moŝto.

Kiel oni hodiaŭ ne povas satigi per „bluaj fazeoloj“ [2] malsatajn buŝojn, tiel ankaŭ tiutempe oni ne povis plibonigi la mizeran staton inter la kamparanoj k devigis ilin plue batali. La tuta germana lando poste ribeliĝis, kio kaŭzis gravajn interpuŝiĝojn. La germanaj kamparanoj, unue malkontentigitaj k tiam forlasitaj de Martino Luter, defendis sin sub la gvido de Tomaso Mincer k Floriano Gejer obstine; tamen ili estis venkataj pro la komunaj streĉoj de la germanaj urboj k de l'nobelaro.

Ankoraŭ la tempo por la libero ne estis veninta, ankoraŭ la nigra standardo de l'kamparanoj ne rajtis anonci la komenciĝon de nova tempo.

La ŝvabaj kamparanoj estis venkataj en la sanga batalo apud Beblingen per perfido en la jaro 1525 k entute disbatataj. La nombron de la mortintaj kamparanoj oni taksas je 9 000.

Fr. Mering, la konata marksista historiisto, sciigis foje: „La 12 postuloj, kiujn la kamparanoj prezentis, estis nepre laŭ la senco de l'historia progreso; ili postulis la elekteblon k eloficigon de la pastroj fare de la komunum-estraro; likvidon de l'servuto, de l'fiŝkapt- k ĉas-rajtoj de la nobelaro; limigon de l'troaj tributoj k impostoj, redonon de la al unuopuloj k komunumoj ŝtelitaj arbaroj k herbejoj, forigon de l'arbitra juĝistaro k administracio. Ĉiuj tiuj postuloj estis nepre bonaj k justaj.“

La germanaj k speciale la ŝvabaj kamparanoj havas sian revolucian historion k tiu ĉi historio ankoraŭ ne estas finita. Tiutempe la kamparanoj kantis:

„Venkitaj iras ni hejmen je fin',
heja oho!
Pli bone nepoj finos ĝin, heja oho!“

Nu bone, hodiaŭ estas la vico de l' nepoj. Ni ne hontigu niajn antaŭulojn!

Fr. Spilger (17 679).

[2] T. e. kugloj. — *Red.*

112-paĝa broŝuro estas senpage liverita al la kongresaliĝintoj, k al ĉiuj membroj (kontraŭ nura kompenso de l'afranko).

Pri la proksimjara kongresurbo ni ne ricevis inviton ĉe la Amsterd. Kongreso; oni aludis pri Parizo, sed ni malrekomendis tiun lokon por 1932, precipe pro tiu konsidero, ke en tiu ĉi jaro okazas tie universala kongreso de l'neŭtraluloj organizata per grandaj financaj rimedoj; en tiaj kondiĉoj nia kongreso estus tute sufokata sub la pli grave efikanta propaganda povo de l'neŭtralula aranĝo.

K-do Lanti rilatis kun svisiaj k aliregionaj K-doj pri eventuala organizado de l'XII-a Kongreso tiuloke, tamen senrezulte; dume ni ricevis inviton (en novembro) de la Ŝtutgartaj SAT-anoj. Ĉi tiun inviton ni akceptis, kiam jam urĝis decidi, la 9. dec. Sen malfaciloj konsistiĝis la Organiza Kongr.-Kom., k en bona interkonsento ni per leterinterŝanĝo kunlaboris kun la O.K.K. k informiĝis pri la preparlaboroj. La laboro de l'O.K.K. estis ja speciale malfacila, ne nur pro la ekonomia krizo, sed ankaŭ pro la politikaj cirkonstancoj pli k pli malfavoraj al nia afero nuntempe en Germanio. La O.K.K. meritas gratulojn pro sia vere SAT-aneca laboremo k plenumo de l'taskoj en tiaj cirkonstancoj.

Informservo. Depost precize du jaroj nun ne funkcias la Informservo. La kaŭzoj de l'nefunkciado estas 1) manko de mono pro konataj kaŭzoj; 2) manko de laborfortoj pretaj sin dediĉi al tiu tasko. Ni rememorigas ankaŭ pri la fakto, ke Besler en Lajpcig, al kiu ni siatempe disponigis multobligilon por la informservo, fripone retenas ĉi tiun aparaton; li ne konsentis, malgraŭ multfojaj personaj klopodoj, transdoni ĝin al nia Administranto.

Pri la refunkciigo de l'Informservo ni havis lastatempe korespondadon kun la estraro de ALLE, kiu konigis cirkulere al la LEA projekton pri siaflanka starigo de peresperanta gazetara informservo laŭ la modelo de l' SAT-servo. Malgraŭ ke ni mem nuntempe ne povas pensi pri refunkciigo de l'servo pro la jam menciitaj kaŭzoj, ni esperas trovi kontentigan solvon pri la problemo sur la bazo de nova formulo de kunagado inter nia Asocio k la LEA.

L.E.A. k Gotenburga Konvencio: Estas sentebla la tendenco al pli intima kunlaboro inter nia Asocio k la LEA, kiuj akceptis k aplikas la Gotenburgan Konvencion. Ni povas nur ĝoji pri tio k rimarkigas, ke ĉiam ni estis akceptemaj al la komunikoj aŭ informoj, kiujn ni ricevis por publikigi; neniam ni rifuzis lojale plenumi niajn devojn, rilate al la Konvencio. Kaj kiam, ekzemple, ni ricevis de la Nederlanda Federacio de Lab. Esperantistoj la peton aperigi en „S-ulo“ la informojn pri la LEA sub speciala rubriko, sen ia ŝanceliĝo ni ĝin akceptis. Tiu emo al pli intima kunlaborado speguliĝas, kiel konstateble, en la ĉiapude presita projekto de Statuto. Cetere, je la 4-a de julio ni sendis al ĉiuj estraroj de la LEA-oj leteron, per kiu ni invitis ilin konigi sian opinion pri la organiza demando k fari eventuale konkretajn proponojn.

Ĉu vi jam provis instrui laŭ

PETRO?

La nova, plene reprilaborita k kompletigita eldono permesas ankaŭ al vi instrui laŭ ĉi tiu populara lernilo!

116 paĝoj. Prezo: 1 mk. g.

Administracio de SAT, Leipzig.

Estas tre notinda fakto, ke en „La Socialisto“, la organo de ALLE, aperis serio da artikoloj „pri la organiza problemo“; en kelkaj el ili montriĝis plej evidente partieca k nacieca spirito. Ekzemple iu K-do starigis la demandon: „Kian intereson ili (la socialistoj) havas je la superpartieco“. Kaj alia asertas, ke en la nuna organizsistemo „la landorganizoj havu la laboron k SAT la sukceson“. Ni nur notas tiujn strangajn dirojn k ĉi-loke ne komentas ilin.

Estas ankaŭ menciinda la fakto, ke „La Socialisto“ enmetas esperantlingvan materialon, kiu tute ne rilatas al la propagando de esperanto en germanlingvaj regionoj k devus havi lokon en „S-ulo“. Tio havas kiel rezulton konkurencon al nia organo k sekve tute kontraŭas la Konvencion de Gotenburgo, kiun tamen ALLE akceptis.

Precipe kontentigan kunlaboron sur la Konvencia bazo ni atingis kun la Nederlanda LEA (NFLE), kiu rilatis eĉ al interkonsento pri teknikaj aferoj, kia la enkasigado de kotizoj. La ĉefperanto de SAT por Nederlando havas regulan rubrikon en la koncerna LEA-organo. En unu Amsterdama LEA-sekcio aŭtomate ĉiuj membroj per sia kotizpago estas aligitaj al SAT kiel aspirantaj membroj.

„La Lernanto“n aldonas al sia organo nuntempe nur la SLEA (Sveda LEA); sufiĉe grandan kvanton da ekzempleroj mendas ankaŭ F.E.O. (la franclingva LEA) por distribuo ĉe siaj grupoj.

Inter la LEA, akceptintaj la Konvencion k dume ne forpuŝintaj ĝin, ni havis diskutadon pro opinia diferenco nur kun A.L.L.E. (aŭstria LEA), kiu cetere, kiel en pli fruaj, ankaŭ en sia lasta kongreso akceptis rezolucion, per kiu ĝi montras sian preferon por la *inter*nacieca organizsistemo k malkonsenton al la nuna strukturo de SAT.

Ni mem ja ne havas la opinion, ke la Gotenburga Konvencio estas io absolute perfekta, k ni tre deziras konkretajn rezultojn tiurilatajn el la intertraktoj ĉe la nuna Kongreso.

*

En pluraj LEA agitadis febre la t.n. „unuigaj komitatoj“, sub kiu nomo — paradokse — sin kaŝas la skismuloj, formontaj sian konkurenc-organizon.

Estas nature, ke la reefikoj de tia agado por la tuta disvolviĝo de nia movado, en nacia kiel en tutmonda skalo, estis tre malavantaĝe sentataj, ke en multaj lokoj la grupa vivo stagnadis, kursoj malsukcesis, ktp. Tiuj kaŭzoj, aldone al la terura senlaboreca krizo k al la fakto, ke SAT estas malpermesita en kelkaj landoj, inter kiuj Sovetio, klarigas pli ol sufiĉe la malprogreson de nia movado.

(Daŭrigo k fino en la venonta n-o.)

Pro la publikigo de la porkongresa raportaro ni devas prokrasti la aperigon de pluraj ricevitaj manuskriptoj ĝis la n-o 393.

Projekto pri nova Statuto de SAT.

ellaborita de la Statutkomisiono, elektita ĉe la Amsterdama Kongreso, k proponata por pristudo al la XII-a Kongreso.

Celo.

1. (La unua paragrafo restu neŝanĝita.)

Membreco.

2. Ekzistas 3 kategorioj da membroj: aktiva, aspiranta, subtenanta.

3. Povas esti aktiva membro ĉiu persono, scipovanta esperanton, kiu, akceptinte ĉi tiun statuton, pagas la jarkotizon, ĉiujare fiksitan de la Plenum-Komitato (P.K.).

4. Aktivaj membroj rajtas: A) ricevi la Jarlibron k la oficialan organon de la Asocio, — B) partopreni en ĉiu referendumo, — C) voĉdoni en la Kongresoj, — Ĉ) uzi la ĝeneralajn servojn de la Asocio. Aktivaj membroj do povas influi la gvidadon de la Asocio; ili havas la devon ĉiel laŭpove helpi al la prosperado k bona funkciado de la Asocio.

La samfamiliano(j) de aktiva membro povas ĝui la samajn rajtojn kiel ĉi tiu lasta, pagante nur la kotizon fiksitan por aspiranta membro. Tiaj membroj tamen ne ricevas apartan ekz-on de la oficiala organo.

Ankaŭ al membroj senlaboraj, aŭ estantaj soldato aŭ malliberulo, kiuj jam dum pli ol 2 jaroj apartenis al SAT k faris multon por ĝi, la PK povas konsenti provizore aktivan membrecon, kontraŭ nura pago de la kotizo de aspiranta membro.

5. Povas esti aspiranta membro ĉiu persono, scipovanta esperanton, kiu, aprobante la statuton, pro iuj kaŭzoj ne povas pagi la kotizon por aktiva membreco. Aspirantaj membroj ricevas la Jarlibron k rajtas uzi la ĝeneralajn servojn de la Asocio.

6. Povas esti subtenanta membro: A) lernanto de esperanto, – B) ĉiu persono aŭ organizo, esperantista aŭ ne, kiu deziras subteni la Asocion per monhelpo. Subtenantaj membroj ricevas la Jarlibron k rajtas uzi la ĝeneralajn servojn de la Asocio.

Membriĝo.

7. Principe la administra jaro kalkuliĝas de 1. januaro ĝis 31. decembro. La membreco estas definitiva nur post pago de la kotizo. En lokoj, kie jam troviĝas pluraj membroj, oni prefere aliĝu pere de la loka peranto.

Eksigo.

8. Estas eksigataj el SAT la membroj, kies agado ne konformiĝis al la Statuto, kiuj intence agis kontraŭ la celoj, principoj aŭ interesoj de la Asocio, kiuj malbonuzis la konfidon aŭ servemon de aliaj membroj. En gravaj okazoj, la eksigoj estas publikigataj en la presorgano. Plendoj kontraŭ iu membro devas esti sendataj al Konflikt-Komisiono, kiu juĝos post la memdefendo de la kulpigito. La eksigito rajtas apelacii, ĝis 30 tagoj post ricevo de la decido. Se necese, la Konflikt-Komisiono komisios al la plej proksima loka membraro (aŭ izolulo) esplori la aferon k raporti. – La K.K. proponas la eksigojn al P.K., kiu havas la findecidrajton.

Organizado.

9. La organoj de la Asocio estas: A) Referendumo, – B) Plenum-Komitato, – C) Ĝenerala Konsilantaro, – Ĉ) Kongreso, – D) Konflikt-Komisiono, – E) Presorganoj.

Plenum-Komitato.

10. La gvidado de la Asocio estas komisiata por du jaroj al P.K. – Ĝi konsistas el 6 membroj loĝantaj en la sama urbo. – La pagataj oficistoj de la Asocio povas esti P.K.anoj, sed ne rajtas voĉdoni pri aferoj koncernantaj sian propran situacion, plie ilia nombro en tiu instanco ne povas superi la proporcion 1 : 3. – La P.K. elektas inter si prezidanton, kies voĉo estas decida en okazo, se ĉe voĉdono montriĝas egala nombro da por- k kontraŭ-voĉoj.

11. La P.K. estas elektata de la tuta aktiva membraro per referendumo. La baloto okazas laŭ jena procedo: 5 monatojn antaŭ la koncerna Kongreso, P.K. sciigas en la presorgano, ke ĝia mandato finiĝas. La membraro en iu ajn urbo en la mondo, kunveninte laŭregule k decidinte pri tio, rajtas proponi sian urbon kiel sidejon de la Asocio. Ĝi sciigas tion al la funkcianta P.K. k samtempe sendas la nomojn de la kandidatoj, kiuj estas proponataj de la loka membraro per plimulto da voĉoj. Ĉi tiu voĉdono okazu per balotiloj sendataj al ĉiuj membroj en la koncerna urbo k tiuj balotiloj estu konservataj por ebligi kontrolon. La kandidataj urboj k personoj (nedisigeblaj) estu konigataj en la presorgano almenaŭ 2 monatojn antaŭ la kongreso k diskutataj ĉe la kongreso. La referendumo findecidas. Nova P.K. ekfunkciu en januaro post la kongreso.

12. Por eviti ĉian naciecan influon en la gvidado de la Asocio, validas la elekto de P.K. nur en la okazo, se la enlandaj jesaj voĉoj por la kandidatoj en iu lando ne superas 1/3 de la tuta balotintaro. Aliokaze validu elekto de aliaj kandidatoj, kiuj ricevis pli ol trionon da voĉoj el la tuta balotintaro, sed kiuj estas dividitaj en pli normala maniero laŭ landoj. Kiam estas kandidatoj en pli ol du diversaj urboj, tiam validu la elekto de tiu(j), kiu(j) ricevis la absolutan plimulton. Aliokaze refoja baloto estu aranĝata inter tiuj du kandidataj urboj.

13. En okazo de eksiĝo(j) de P.K.-ano(j), la membraro en la urbo de l' sidejo elektas anstataŭantojn. Se eksiĝis samtempe pli ol la 1/2 de la tuta P.K., tiam ĝi organizas novelekton laŭ paragrafo 11.

Kion vi faris, K-do,
por ke
LA NOVA EPOKO
la bela literatur-scienca revuo de SAT, aperu plue regule?

Ĉu vi helpis pligrandigi ĝian eldonkvanton, per varbo de novaj abonantoj? Aŭ ĉu vi pagis mem apartan abonon por havi je via dispono duan ekzempleron?

14. Rajtas esti P.K.ano nur membro havanta almenaŭ 3 sinsekvajn jarojn da aktiva membreco k ne aliĝinta al iu el la t.n. neŭtralaj esper. organizoj.

Perantoj.

15. Se en iu loko troviĝas pluraj membroj, ili elektas peranto(j)n, kiu(j) gvidas la administran k propagandan laboron por SAT en la koncerna loko. Por plenumi tiun elekton, la SAT-rondo kunvokas *ĉiujn* anojn loĝantajn en la urbo k ĉirkaŭaĵo.

Ĝenerala Konsilantaro.

16. La Ĝ.K.aro konsistas el: A) unu membro el ĉiu geografia sektoro, elektataj per referendumo samtempe kun la P.K., B) La Konflikt-Komisiono, C) unu reprezentanto de la membraro el la urbo, en kiu sidas la P.K., Ĉ) unu reprezentanto de ĉiu L.E.A. konvencie ligita kun SAT, D) unu membro de ĉiu fako (Administracio, Literatura Sekcio ktp.) funkcianta ekster la sidejа urbo de SAT. La sekretario de la K.K. estas ankaŭ sekretario de la Ĝ.K.-aro k funkciigas tiun organon.

17. La Ĝ.K.aro helpas al P.K. per siaj informoj k konsiloj. Ĝi plie observas k kontrolas la agadon de la P.K. – Se la Ĝ.K.aro rimarkas, ke tiu agado ne estas honesta k laŭstatuta, ĝi rajtas konigi siajn konstatojn al la tuta membraro per la presorgano. La Ĝ.K.-aro prezentas raporton antaŭ ĉiu Kongreso. Ĝi rajtas demandi al la P.K. pri ĉiuj aferoj k postuli respondon.

Konflikt-Komisiono.

18. La Kongreso elektas K. K. konsistantan el 3 membroj (loĝantaj en la sama loko) kies tasko estas esplori k laŭeble solvi la konfliktojn inter la membroj k se necese proponi eksigojn (vidu § 8).

Kongreso.

19. Ĉiujare, se eble, okazas Kongreso de SAT, kies lokon, daton k kondiĉojn difinas la P.K., laŭeble konforme al deziro de la lasta Kongreso.

20. La Kongreso ekzamenas, aprobas aŭ malaprobas la moralan k financajn raportojn de la P. K. k de la Ĝ.K., kiuj laŭeble devas esti koncize aperigataj en la presorgano plej laste 20 tagojn antaŭ la Kongreso.

21. La Kongreso esploras la diversajn proponojn pri la agado de la venonta jaro k vortigas siajn konstatojn k dezirojn, konigotajn al la tuta anaro. – La Kongreso esprimas pri ĉiuj proponoj sian opinion aproban aŭ malaproban. Referendumo findecidas pri ĉiuj proponoj.

22. Ĉiu aktiva membro rajtas doni mandaton al iu alia aktiva membro,

por ke li voĉdonu ĉe la Kongreso en lia nomo. Sekve kongresanto povas rajti tiom da voĉoj, kiom da mandatoj li posedas. Tiuj mandatoj devas surhavi la nomon, membronumeron k subskribon de la mandat-doninto, por ke povu okazi kontrolo.

Proponoj k Voĉdonoj.

23. Ĉiu aktiva membro rajtas sendi proponojn pri la agado de la Asocio al P. K., kiu post ekzameno decidas pri ilia publikigo en la presorgano. Principaj proponoj estu publikigitaj almenaŭ en la antaŭlasta numero de la presorgano aperanta antaŭ la Kongreso.

24. Ĉiun proponon prezentatan de almenaŭ 1/10 el la membraro, la P. K. estas devigata publikigi en la presorgano.

25. 2/10 el la membraro rajtas postuli la okazigon de referendumo pri malfido al la P.K. aŭ pri ĉiu ajn demando havanta grandan intereson por la tuta Asocio.

Servoj.

26. La servoj de la Asocio estas rezervataj al ĝiaj membroj aktivaj, aspirantaj k subtenantaj.

27. Principe la membroj aktivaj k aspirantaj devas doni senpage informon k helpon pri vojaĝo, enketo ktp., al ĉiu membro, kiu sin turnas al ili. Ili havas la devon respondi ĉiun laŭregulan informpeton de alia membro, en templimo de 15 tagoj, eĉ se ili havas nenian kompetenton por plenumi la deziron de la petanto. Tamen ili rajtas ne respondi al petanto se: A) la letero ne estas redaktita esperantlingve, — B) la peto havas karakteron konfidencan aŭ ofendan, — C) la afero postulas elspezojn, ekzemple se responda afranko ne estas aldonita, — Ĉ) la membronumero ne estas indikata.

28. Resume: ĉies devo estu tia, ke la Asocio fariĝu kvazaŭ tutmonda retaro, kies maŝoj estas solidaraj inter si, k ke ĉiu trovu en alia membro la plej bonan k la plej certan peranton por vojaĝo, dungiĝo, informo, enketo, serĉoj ktp.

La membroj firme konvinkiĝu k neniam forgesu, ke ilia aparteno al SAT donas al ili ne nur rajtojn sed ankaŭ devojn; la Asocio ja havas praktikan k idealan celon, ĉies devo estu do memedukiĝi por fariĝi ĉiurilate inda batalanto laboranta efike al starigo k prosperigo de senklaseca k senekspluateca socio.

Rimarkigo. — La ĉi-supra projekto de Statuto en sia ĝenerala konsisto havas la aprobon de ĉiuj komisionanoj; rilate al kelkaj detaloj la opinioj iom diferencas. Ekzemple, kelkaj tute kontraŭas al la artikolo 22, dum aliaj senentuziasme konsentas al ĝia akcepto. Dumkongresaj diskutoj espereble helpos trovi la ĝustan solvon al la problemo.[1]

Proponoj al la XII-a Kongreso de SAT.

1.

La XII-a Kongreso elektu por la Asocio unuecan standardon, per kiu ni ĉiam povos prezenti la Asocion k ĝenerale la laboristan esperantistan movadon.

Amsterdama SAT-Rondo.

Motivigo: Ĝis nun ni vidas en niaj manifestacioj k dum niaj ekskursoj diversajn flagojn, plejparte neŭtralajn. Malmultaj montras la apartan karakteron LABORISTAN, k SE ili montras ĝin, ili faras tion tiel diverse, ke la akcento tute perdiĝas.

2.

Forstreku el § 4 de la Statuto la alineon b).

Motivigo: La nuna formo de la paragrafo estas kvazaŭ klasa dekreto: Kiu havas monon, tiu havas rajton. Estas neeble al granda aro da membroj, pagi la jarkotizon de 8 mk. g. La eblo, fari esceptojn, dependas de bonvolo de iuj K-doj; ĝi estu anstataŭata de forstreko de la tuta alineo.

3.

Forstreku el § 11 la alineojn a) k b) k ilin anstataŭu per: ...: el la reprezentantoj de la landaj organizoj aliĝintaj al la Konvencio de Gotenburgo. La landaj organizoj elektas por po 500 membroj unu reprezentanton al la Ĝenerala Konsilantaro.

Motivigo: La landaj organizoj per la Konvencio de Gotenburgo preskaŭ ne havas rajtojn, sed multajn devojn. Decas, ke ili partoprenu la gvidadon de SAT. Kandidatoj el „sektoroj" ĝenerale estas nekonataj al K-doj ekstersektoraj, tia elekto estas farso. Kandidatoj el la landaj ligoj ĉiam estas konataj. Oni bone povas prijuĝi elekton aŭ neelekton.

4.

§ 16: Anstataŭu la vorton „sektoro" per regiono.

5.

§ 27: Nova teksto: La kongreso decidas definitive pri ĉiuj asociaj aferoj k ev. farataj proponoj.

Se tion decidas la kongreso aŭ se tion postulas 1/20 de la membraro, la Plenum-Komitato aranĝas referendumon.

6.

§ 28: Aldonu: Ĉiu membro rajtas disponi pri la voĉoj de aliaj membroj ne ĉeestantaj, se li prezentas subskribitan rajtigilon.

7.

§ 30: Anstataŭ 1/10 metu 1/20.

8.

§ § 31—32: Forstreku.

Motivigo al proponoj 5—8: La nuna stato de „hazardaj" kongresanoj estu forigata per la rajto de ĉiu membro, transdoni sian voĉdonan rajton al kongresano. Tiel grupoj havas la eblon, komune sendi delegiton, kiu povas voĉdoni por siaj sendintoj! Tiel la kongresdecidoj povas esti vera volesprimo de la tuta anaro.

Por atingi referendumon laŭ nuna § 32 oni bezonas kalkulante kun 2 000 anoj nete 500 voĉojn, por eldevigi referendumon. Praktike tio signifas (ĉar oni povas kalkuli kun 50%a partopreno je ĝi), ke oni anticipe devas disponi proksimume pri la plimulto de voĉdonantoj.

Berlinaj SAT-anoj 866, 13 553, 15 496, 15 968.

[1] La ĉi-supra teksto estis jam sendita al la presejo, kiam trafis la Sekretarion la respondo de K-do Hans Falkenherr (Dortmund), ano de la statutkomisiono. En sia kritiko tiu K-do rekomendas anstataŭi ĉe la paragr. 3 la vorton „Plenum-Komitato" per Referendumo k ĉe la paragr. 10 aldoni: „en okazo de malkonfido tuja revokeblo".

Pri la organizformo de SAT.

La legado de l'„Publika letero" n-o XI konvinkis min, ke miaj spertoj baziĝas sur faktoj. Estas do certe, ke en SAT ekzistas aro da anoj, kiuj opinias necese aŭ bone, ŝanĝi la nunan strukturon *sen*naciecan en *inter*naciecan. Jam mi aŭdis tiun opinion reprezentata sufiĉe fanatike en Vieno, jam mi legis ĝin en organo de ALLE k SEA. Malgraŭ multa pripensado mi ne povis ekkoni ĝis nun faktan neceson aŭ eĉ profiton por la organizo k ties anoj. Mi k la plej multaj anoj pripensintaj la situacion deziras la daŭrigon de l' nuna formo. Tial mi kontraŭmetas al la ŝanĝemuloj jenajn liniojn por konsidero antaŭ iliaj pluaj provoj.

Vera SAT-ano, obeanta la statuton, tute ne povas ekpensi pri ŝanĝo de l'strukturo. Tio signifus ŝanĝon de nia nomo. Ni estas kulturasocianoj k havas celon unikan. La edukado, flegado, kulturado de pens- k agmaniero *sen*nacieca ĉe niaj anoj estas trajto, kiu nekompareble diferencigas nian asocion de ĉiuj aliaj. Ĝi ja estas kvazaŭ la mortero kuntenanta la idean konstruon de SAT. Do, ŝanĝante la strukturon nunan en internaciecan, oni forprenus la kulturan celon, malnecesigus la asocion k tiel eble forigus tre multajn SAT-anojn vere idealistajn. Laŭ nuna cerbostato ĝenerala, k laŭ tiu de l'ŝanĝemuloj, la celo kultura de SAT ankoraŭ estas estonteca. Kredeble malmultaj jam estas maturaj por kompreni ĝin plene. Tamen la sennaciecigo estas nia tasko. Tial ni neniam reiru la vojon historian. Ĉiuj LEA konsentis dum jaroj, ke ili ne havu konstantan ekziston, sed ke iom post iom ili likvidiĝu k transigu siajn nunajn anojn al la tutmonda asocio. Kial do nun SAT revenu al la LEA? Ĉu ne pruviĝas en kelkaj landoj, ke la LEA sekvas vokojn aŭ devizojn de partioj aŭ proprajn interesojn? Ekz: SEU agas laŭ devizoj de Kominterno k bojkotas ĉion alian. GLEA imitas SEU k hipokritas demokratan statuton. En Ĉeĥoslovakio eĉ ekzistas LEA laŭ la anoj de du lingvoj parolataj tie. Kaj krome ĉiuj LEA deziras favori sin mem.

Ĉar la ŝanĝemuloj plejparte ŝajnas esti socialistaj partianoj, supozeble ili deziras imiti la ekzemplon de SEU-GLEA. La koncernaj tamen pripensu, ke en ĉiu LEA troviĝas membroj alitendencaj, kiuj forlasas la movadon, kiam ĝi ne plu estas laŭplaĉa. Se la proporcio estas favora, eĉ okazos skismo. Ĉe skismo en la nuna laborista esperantistaro tutmonda nepre kulpis la „ortodoksaj" komunistoj. En Germanio nepre kulpis ambaŭ, socialistoj k komunistoj. Sed en skismo estigota per reorganizado, nepre kulpus

nur socialistoj. Ili gardu sin ankaŭ tial, postuli ion por la bono de grupo malgranda, laŭlanda aŭ partitendenca. Kiọn ekzemple la soc-dem. partio faros por ni? Same tiom kiom la kompartio. Raporti aŭ fanfaroni pri akiro de organizo, krome nenion. Estas risko, meti kulturcelon je la servo de partio. Nia SAT-celo certe tute malaperus, ĉar ĝi ne estus komprenata. Tion grave helpus la granda nombro da duonesperantistoj aŭ esperantanoj, kiuj nun estas edukataj, sed poste plenrajte taksus sin finlernintaj, altkvalitaj. La nombro da anoj ne iluziigu nin. Ĉu ne estus ĝojiga stato, se niaj ĝisnunaj anoj plene estrus la lingvon k ankaŭ plene komprenus la kulturan celon de nia asocio? Se ni povus jam plene ignori nacilingvojn en nia medio, ni multe pli propagandus ol per LEA-gazetoj, plejparte nacilingvaj, kiuj ne edukas, sed nur igas polemikemaj la anojn k kritikemaj legantojn eksterorganizajn. Per fordono de unu punkto el nia statuto ni do riskas, ke duonk ne-esperantistoj perfortos la asocion k eble pli k pli forigos la unikan celon.

Iuj SAT-anoj opinias, ke ni devus organizi nin analoge al aliaj internaciaj organizoj. Sed ili forgesas, ke ni havas lingvon — ligilon nepre senliman. Movado simple „inter“nacia ne tendencas forigi la limojn. Tion pruvas la mondkapitalistaro organizita internacie. Ĝi okazigas siajn militojn internacie. Ni esperantistoj havas la plej progresigan rimedon por senlimigo de la mondo. Ni do apliku ĝin digne laŭ senco k postulo de l'progreso. Por ni ne plu taŭgu la vorto „internacia“. Ĉiuj organizformoj bazitaj sur internacieco estu por tiuj, kiuj ne jam iris nian idean vojon. Nia afero ne disvolviĝas laŭ iu nacia instigo, nek retenas ion de iu nacio. La fondintoj de nia asocio riskis fondi ĝin laŭ principo s e n naciceca, dum tempo historie grava antaŭ la nuna. Ni ne forĵetu tiun noblan kreaĵon pro iu „taktiko“, kiu nur ŝajnas garantii ion por anoj de ia tendenco, sed fakte havigos nenian ekvivalenton por la fordonenda kulturcelo. Ĉiu pripensu, kion li gajnus per alia strukturo, k li baldaŭ nuligos siajn postulojn. La interrilatoj certe havus la samajn kondiĉojn kiel nun. Se mi sendas poŝtkarton al la nula horzono, ĝi kostas 15 pfenigojn. Se mi sendas ĝin al Anglio aŭ Francio, ĝi ankaŭ kostas 15 pfenigojn. Landaj registaroj, estraroj, organizoj nek ĝis nun, nek pli poste grave helpos nin. Surpapera agnosko al niaj celo k afero plejparte okazis laŭ partiecca flatemo. Sed por posedi estimon k simpation de ĉiuj korporacioj senpartiece, nur objektive, kio taŭgas pli ol SAT kun sia nuna strukturo? Estu do konsekvencaj, daŭrigu instrui, klerigi vin mem k viajn Gek-dojn en la plena senco de nia asocio s e n nacieca.

Fritz Hergesell (5320).

XII-a Kongreso de SAT en Ŝtutgart.

6.—11. aŭgusto 1932.

4-a Komuniko.

Kongresaliĝoj: Ĉiujn sendu al la *adreso de l'O.K.K., K-do W. Neumann, Stuttgart, Vogelsangstr. 66.* Aliĝilojn petu de tie. Kiu ne anoncos sin ĝis la 15-a de julio, al tiu ni ne povos garantii senpagan loĝejon. Do rapidu aliĝi! — Ĉiu aliĝinto ricevos gvidlibron ilustritan pri la kongresurbo kun urboplano, kiu montras stratindekson. Plie ni donos presitan kongresprogramon (broŝurforme) k specialan kongresinsignon. Al tiuj, kiuj ne povos partopreni la kongreson, ni sendos tiun materialon.

Loĝejoj: Kiel jam pli frue dirite, ne-SAT-anoj povos partopreni la kongreson kiel gastoj. Pri privataj senkostaj loĝejoj ni ne povas garantii. Kompreneble nia unua devo estas, helpi tiurilate al SAT-anoj. Konsideru, ke la proletoj troviĝas ankaŭ ĉi tie en tre mizera stato pro senlaboreco ktp. Senkostaj loĝejoj tial estas tre malfacile troveblaj. Pro tio ni alvokas ĉiujn kongresontojn, kiuj iel povos pagi rekompencon por loĝejo, fari tion k anonci al ni, por ke ni povu rezervi la senpagajn loĝejojn al aliaj Gek-doj. La loĝejkartoj estos disdonataj en la kongresejo. — *Nepre ni avertas senmonulojn, ne esperi subvencion de l' O.K.K.!* Fakte nia kasostato ne ebligas tiajn subtenojn.

Pasport- k vizaferoj: Pasporton ĉiu negermana kongresonto devas posedi. Ĝi estas plejparte havebla ĉe la landa polico. Germanan vizon bezonas Gek-doj el jenaj landoj: Albanio, Belgio, Bulgario, Francio, Grekio, Litovio, Polio, Rumanio, Sovetio, Turkio k ĉiuj ekstereŭropaj landoj.

Gek-doj, kiuj havos malfacilojn rilate la ricevon de l'vizo, tuj informu nin, por ke la O.K.K. povu interveni.

Veturprezoj: Ni atentigas pri tio, ke la germana regna fervojo dum la tempo de 1. 6. — 15. 10. 32 eldonas t. n. *somerferiajn veturbiletojn*, kiuj kostas 20 % malpli ol la ordinaraj. La minimuma distanclimo estas 200 kilometroj. Tuj la aĉetinto de tia karto devas forveturi k reiri ne antaŭ la 11-a validotago. Negermanaj Gek-doj postulu ĉe germanaj stacidomoj „Somerurlaŭbskarte, driter Klase naĥ Ŝtutgart“.

Vivteno: Ĉiujn manĝaĵojn, ankaŭ vegetarajn, la kongresontoj ricevos malmultekoste en la kongresejo „Salbaŭ Vule“. Tag- k vespermanĝoj variaj kostos 60 ĝis 100 pfenigojn, matenmanĝo (kafo, teo aŭ nur lakto kun bulkoj, butero k mielo) proks. 50 pfg. Por nutrado do vi devas kalkuli proks. 2.— mk. g. Loĝonte en simpla hotelo vi verŝajne elspezos *2.— ĝis 3.— mk.g.* (nur por dormi tie). En la metalista hejmo ni luis 30 litojn, parte apartajn ĉambrojn, po *3.20 mk. g.* (inkluz. matenmanĝo k „trinkmono“) por persono. Kiu deziras loĝi tie?

Monŝanĝo: La Gek-doj prefere kunportu sialandan monon k *ne ŝanĝu ĝin* jam semajnojn antaŭ la kongreso. Povos esti, ke la germana registaro de hodiaŭ ĝis morgaŭ dekretos por la germana valuto *inflacion.* Kongresontoj havos okazon ŝanĝi siajn monbiletojn en la proksimo de l'kongresejo.

Akceptejo: Pri tio sekvos informoj. La Gek-doj, kiuj aranĝos karavanojn per aŭtobusoj, sciigu al ni ĝustatempe, ĉu ni zorgu por aŭtomobila restadejo. Kongresontoj venontaj jam antaŭ la kongresdato, skribu, kiam ili trafos al Ŝtutgart, por ke ni povu akcepti ilin.

Kongresejo: Ĝi estas tre facile trovebla. Ĝi estas nur kvin minutojn for de l'ĉef-stacidomo. Vi iru de la ĉefstacidomo tra la Ŝiler- al Nekarstrato. Cetere la adreson de l'kongresejo vi ankaŭ ekvidos sur tabulo antaŭ la ĉefstacidomo.

Provizora laborplano dum la 12-a Kongreso:

(Ĉiuj kunvenoj k kunsidoj okazos en la Kongresejo.)

Sabaton, la 6-an de aŭgusto.

20-a horo: Publika varbvespero kun ekspozicio komune kun la laboristaj abstinentuloj k fotosekcio de l'lab. turist-unuiĝo „la Naturamikoj“.

Dimanĉon, la 7-an de aŭgusto.

8-a horo: Vizito al urba laktcentrejo.

13-a horo: Komuna fotado k poste marŝado al lab. sunban- k naĝejo.

20-a horo: Granda *publika* salutkunveno.

Lundon, la 8-an de aŭgusto.

9-a horo: Unua laborkunsido.

14-a horo: libera por komuna promenado tra la urbo k vizitoj al 1) urba buĉejo, 2) urba gasproduktejo, 3) „Vajsenhof-kolonio“.

20-a horo: Dua laborkunsido.

Mardon, la 9-an de aŭgusto.

9-a horo: Tria laborkunsido.

14-a horo: Kunveno de l'SEA-anoj.

20-a horo: Kvara laborkunsido.

Merkredon, la 10-an de aŭgusto.

9-a horo: Frakcikunsidoj (socialista, komunista, sennaciista, anarkista).

14-a horo: Kvina laborkunsido.

20-a horo: Kunsidoj de la liberpensula k junulara sekcioj.

Ĵaŭdon, la 11-an de aŭgusto.

9-a horo: Sesa (lasta) laborkunsido.

14-a horo: Fakkunsidoj, kunveno de l'kontraŭmilitista sekcio.

20-a horo: Publika adiaŭa vespero (kontraŭmilitista manifestacio).

Vendredon, la 12-an de aŭgusto.

Ekskursoj: 1) Komuna aŭtobusveturado al „Knibis“ en la „Nigra Arbaro“ apud Frejdenŝtat. Laŭdezire tranoktado en la tiea naturamika domo. Elspezoj entute – sen nutrado – proks. *5.– g. m.* Povos okazi nur, kiam sufiĉa nombro da Gek-doj anoncos sin por tio.

2) Marŝado tra la „Nekar-valo“ al Eslingen. Elspezoj *1.– g. m.*

3) Marŝado de „Ror“ al la Naturamika domo en Ajdlingen. Tie tranoktado. Elspezoj proks. *2.50 g. m.*

4) Vizito al lab. sunban- k naĝejo apud „Ror“. Elspezoj ĉ. *0.80 g. m.*

Informpetojn direktu a) pri la kongreso al la adreso de l'O.K.K. – b) pri la junulara tendaro sur „Katrinenlinde“ al K-do Oskar Wettig, Gelnhausen. O.K.K.

El *Parizo* biciklos kelkaj Gek-doj al la junulara tendaro k kongreso. Ekveturo ĉ. 20-a de julio. Kiuj volas kunveturi, skribu tuj al K-do A. Ozerée, 40, rue Mathis, *Paris 19.*

4-a listo de partoprenontoj.

85	17934	Enghofer Anna, München	(Germ.)
86	–	Schuster Otto, Stuttgart	(Germ.)
87	94	Messmer Ant., Frankfurt	(Germ.)
88	17556	Gunsilius H., Geislingen	(Germ.)
89	17961	Letsche Rob., Geislingen	(Germ.)
90	–	Boschmann H., Geislingen	(Germ.)
91	–	Kühnle Berta, Geislingen	(Germ.)
92	–	Moessmer Bl., Geislingen	(Germ.)
93	16731	Herrmann A., Rosenthal	(Germ.)
94	12721	Wessels W., Amsterd.	(Holando)
95	7688	Hawksworth Ch., Liverp.	(Anglio)
96	4304	Sulsky Joel, Harpenden	(Anglio)
97	135	Schinkel R., Leipzig	(Germanio)
98	3020	Platiel H., Leipzig	(Germanio)
99	17444	Paquier F., Paris	(Francio)
100	12943	Koth Otto, Potsdam	(Germanio)
101	16174	Koth E., Potsdam	(Germanio)
102	–	Goedejohan Chr., Rotterd.	(Hol.)
103	–	Goedejohan M, Rotterdam	(Hol.)
104	–	Lans J., Rotterdam	(Holando)
105	–	Hamelink N., Rotterdam	(Hol.)
106	–	de Vries A., Amsterdam	(Hol.)
107	17867	Huisman A., Amsterdam	(Hol.)
108	4226	Österholm K., Malmö	(Svedio)
109	17706	Montano	(Germ.)
110	12896	Bepperling E., Erzhausen	(Germ.)
111	12121	Versluis D., Zwolle	(Holando)
112	17638	Kloeke W., Zwolle	(Holando)
113	17636	Meyer W., Zwolle	(Holando)
114	–	Langenberg M., Zwolle	(Holando)
115	–	Koster K., Zwolle	(Holando)
116	17951	Benaîm H., Alger	(Afriko)
117	–	Postma J., Hoek v. Holand	(Hol.)
118	16666	Wessels F., Amsterdam	(Hol.)
119	16351	Lord E., Varberg	(Svedio)
120	9534	Michalski W., Charlottenb.	(Germ.)
121	17275	Boeken P., Amsterdam	(Hol.)
122	–	Boeken F., Amsterdam	(Hol.)
123	–	Boeken, Amsterdam	(Hol.)
124	–	v. d. Heide A., Bussum	(Hol.)
125	–	Buis H. Bussum	(Hol.)
126	5386	Dann E., New-York	(Usono)
127	17680	Föhsel E., Stuttgart	(Germanio)
128	–	Demmenie C., Amsterdam	(Hol.)
129	17473	Demmenie M., Amsterdam	(Hol.)
130	–	Thomalle R., Meissen	(Germanio)
131	–	Thiel H., Meissen	(Germanio)
132	4405	Kolditz O., Magdeburg	(Germ.)
133	17422	Leidenroth G., Magdeb.	(Germ.)
134	17424	Görisch O., Magdeburg	(Germ.)
135	–	Görisch E., Magdeburg	(Germ.)
136	–	Brodthuhn G., Magdeb.	(Germ.)
137	–	Brodthuhn Gerda, Magdb.	(Germ.)
138	–	Raabe G., Magdeburg	(Germ.)
139	–	Breitenstein M., Magdeb.	(Germ.)
140	10082	Neumann W., Stuttgart	(Germ.)
141	8478	Kuhnt Erich, Dresden	(Germ.)
142	3681	Azorin F., Cordoba	(Hispanio)
143	11761	Waldmann A., Bremen	(Germ.)
144	17661	Eggers E., Bremen	(Germ.)
145	17663	Krenzlin E., Bremen	(Germ.)
146	15976	Preker J., Amsterdam	(Holando)
147	5443	Schäfer P., Plieningen	(Germ.)
148	17031	Veen M., Amsterdam	(Holando)
149	13606	Veen A., Amsterdam	(Holando)
150	13395	Noel E., Le Havre	(Francio)
151	15673	Rooseboom J., Enschede	(Hol.)

Ni dankas pro jenaj mondonacoj:

K-doj: Rival 0.70 mk.g., Sulsky 1.45 mk.g., Hawksworth k Hermann po 0.10, Wessels 0.22, de Man 0.85, Bepperling 0.50, Benaîm 0.70, Wessels F. 0.25, Michalski W. 0.50.

Jenan subtenon ni ricevis per kolekt-listoj:

Kongreso de Ned. L.E.A.	10.15 mk.g.
Grupo Geislingen	10.– mk.g.
K-do Schneider	2.– mk.g.
Kolektlisto 25 (K-do Minke)	9.52 mk.g.
Grupo Nov-Jorko	37.15 mk.g.
Kamparanino	10.– mk.g.

Al ĉiuj donacintoj koran dankon!

O. K. K.

Atentu, propagandistoj!

La Redakcio sendos al vi por ekspoziciaj celoj pakaĵon, konsistantan

el ĉ. 15 diversaj esp. gazetoj kontraŭ pago de 2 mk. g. (afrankite!), el ĉ. 30 diversaj esp. gazetoj kontraŭ pago de 3.50 mk. g. (afrankite!)

La klasbatalo tra la mondo

El Nederlando.

La Amsterdama komunuma konsilantaro akceptis helpe de 3 socialdemokratoj 4%-an plimalaltigon en la salajro de la komunumaj laboristoj. La socialdemokrataj laboristoj komprenéble indignis pri tio. Ili postulis la eksigon el iliaj postenoj de la 3 „pekintoj“ k tiel kredis influi la politikon de sia partio. Sed, el Ĝenevo, la parlamentano W. H. VLIEGEN skribis poŝtkarton al unu el la „pekintoj“ k en ĝi li esprimis sian plenan solidaron kun la „pekintoj“! *14 942.*

Malsatulaj tumultoj en Usono.

Dekdu tumultoj de malsatuloj okazis en la Los Angeles-a graflando (county) depost aprilo ĉi-jare ĉe la bonfaraj oficejoj. La 12-a tumulto okazis la 3. junio, kiam 10 malsatuloj estis arestataj, 5 el ili transportataj al hospitalo. Kiam la policistoj atakis ilin, ili sin defendis, kvankam nearmitaj. Ĉiuj mebloj en la oficejo estis detruataj.

Troviĝas multaj tendaroj diversloke en Kalifornio, kie homoj klopodas sin memhelpi k tiel eviti la „malhonorsignon“ de bonfarado k insultojn. Multaj dormas ekstere, ie ajn kie estas eble eviti la policistojn. Aŭtomobiloj servas al multaj kiel dormejoj. Dume la malplenaj ĉambroj k domoj multiĝas. *Viktimo.*

Viktimoj de pafado en Slovakio.

Eĉ nun en iuj slovakiaj distriktoj ne ekzistas sezon-laboroj. Tial senlaboruloj ekiris la 8. junio al la distriktestro de Holiĉa, postulante sezonlaboron aŭ subvencion. En la distrikt-oficejo ĝendarmoj atakis ilin k eĉ per fusiloj batis la virinojn. Kaj kiam ekkuris la amaso, la ĝendarmoj direktis la pafadon malantaŭen k vundis du laboristojn grave. La sekvantan tagon okazis pafado ĉe Pelgart, kie en ferkonstruo ekstrikis 3 mil laboristoj pro tio, ke la estro ne volis elpagi la tutan salajron. Tie la ĝendarmoj mortigis nepartoprenanton, kiu vespermanĝis en sia dometo. Sindikataj sekretarioj (socdemokrataj k komunistaj), volantaj trakti laŭkonvencie pri la salajro, estis arestataj. Kiam laboristoj hejmenirantaj ekvidis en la stacio de Pohorela ĝendarmojn kun arestitoj, ili tuj haltigis la vagonaron k postulis ilian liberigon. Pro tio okazis denova pafado k unu laboristo estis grave vundata. *Virgi.*

RELIEFAJ OKAZINTAĴOJ.

La usona prezidanto *Huver* faris proponon al la ŝtatoj malarmadi siajn armeojn k ŝiparojn je triono. La II. Internacio subtenis tiun proponon per manifesto. Japanio kategorie rifuzis trakti pri ĝi.

Germanio postulis en la *Lozana konferenco* egalrajton je armado k likvidon de l'riparpagoj. La kvin grandaj ŝtatoj-ekskunliganoj prezentis al Germanio komunan protokolon kun fikso de definitiva kompensaĵo, kiu anstataŭus iel la riparpagojn; ĉi lastaj estus nuligitaj en sia ĝisnuna formo de militŝuldaj pagoj.

La *germana registaro* publikigis dekreton, kiu rajtigas porti uniformojn (al Hitleranoj) k permesas surstratajn manifestaciojn. La *sudaj ŝtatoj*, precipe Bavario, rezistas al tiu dekreto k insistas pri tio konservi siajn proprajn ŝtatajn privilegiojn. – Ĉiutagaj *stratbataloj* inter Hitleranoj k laboristoj rezultas el la releĝigo de l'faŝistaj ataktaĉmentoj.

En *Siamo* la reĝo estis devigata de generaloj fari cedojn rilate la reĝiman absolutismon. En tiu „ribelo“ la ekonomia krizo ludas gravan rolon.

La *jugoslava* reĝo provas stabiligi sian reĝimon per teroro: torturoj, esceptostataj tribunaloj, politikaj procesoj kun pezaj kondamnoj.

Komunista armeo en *Ĉinio* ree sukcesis proksimiĝi la industrian centron Hankovo; kelkaj Nankin-registaraj regimentoj transiris al la komunistoj.

La ekzekuto al la ok junaj *negroj de Skotsboro* (Usono) estas prokrastita ĝis oktobro pro lastmomenta interveno de l'Supera Tribunalo en Vaŝingtono.

Ĝenerala striko eksplodis en la *belgiaj karbminejoj* (Borinaĝo) pro la maljusta labordivido.

SENNACIULA PEDAGOGIA PAĜO

Redakcia adreso; K-do Simon Aarse, Veeteeltstrato 63, Amsterdam (Holando).

Nuna stato de la Berlinaj lernejoj.

Letero el Berlino.

Depost pasko niaj infanoj eniris novan lernjaron. Post la malgrandaj ferioj ili retrovis la Berlinan lernejaron en stato tre aliiĝinta.

Tiam pli ol deko da lernejoj ne ekzistis plu. Preskaŭ sammultaj lernejoj estis kunigitaj. Sur la malgrandaj lernejaj kortoj, kiuj ĝis nun ne donis sufiĉan lumon k spacon, ankoraŭ pli da infanoj estas kunpremitaj, ĉar en la konstruoj, en kiuj ĝis nun unu lernejo havis spacon, nun subite du lernejoj loĝas. La klasĉambroj estas ankoraŭ pli troplenaj ol ĝis nun, k anstataŭ kvardek infanoj, kiuj la ĉambrojn ĝis nun plenigis, sidas tie kvindek infanoj, kiuj povas sin malbone movi.

Komence de la nova lernjaro aliaj lernantaroj estas translokitaj en aliajn ejojn. Tiam la vojo al ĉi lastaj aliiĝis. Kelkfoje ĝi estas pli longa k pli danĝera por la malgranduloj, kiuj ne estas same dresitaj por la urbega trafiko kiel la plenaĝuloj. La novaj ĉambroj ne estas pli helaj, pli belaj k pli modernaj ol la malnovaj.

Kie ĝis nun la okuloj infanaj malboniĝis pro la gaslumo, tie en la nova jaro la afero ne aliiĝis. Urĝaj riparoj koncerne benkojn, murojn, ŝtuparojn, kiujn oni nepre devus fari pasintjare, ankaŭ nunjare ne estos faratai. Jen malĝojiga bildo pri longatempa, malrapida ruiniĝo de la Berlinaj lernejoj.

Infanoj estas senĉagrenaj k senzorgaj. Feliĉe ili ne scias, kion ili perdas pro tiu ĉi lerneja politiko. Ili ne antaŭsentas, kiel oni faras pekon al ili. Sed la plenkreskuloj scias tion; sed ne nur la gepatroj, ankaŭ la lernejaj administracioj, kiuj ordonas tiujn ŝparajn antaŭrimedojn, aprobante la forigon k kunigon de lernejoj. La administracio ja scias, kiajn danĝerojn la kunpremado de tiom da infanoj en unu klasĉambron signifas; la administracio ja scias, kion signifas, ke laŭintence ĝis aprilo *284 klasoj* malaperos k la ĝenerala klasfrekvento estos plialtigita je 37,5%. Oni scias en la lerneja deputitaro, ke jam nun multaj klasoj ekzistas kun 50–55 infanoj. Preskaŭ ĉiutage alvenas plendoj de la instruistoj, ke la instruo estas malkompleta k la laboro penplena en tia situacio. Kaj ankaŭ la lernejaj kuracistoj estas tute ne tiom blindaj, por ne scii la danĝerojn, kiujn alportas la daŭra troplenigado. Oni scias la danĝeron de plialtigata infekteblo dum epidemioj en troplenigitaj klasoj. Oni scias tre bone, ke en Berlino lernejoj ekzistas, el kiuj oni ne povas malproksimigi iujn malsanojn malgraŭ sanigaj antaŭfaroj. Ĉiuj antaŭfaroj devas esti malutilaj, se oni ne ekkaptas la malbonon ĉe la radiko, forigante la malbonan troplenigadon de la lernejoj.

Se nun, malgraŭ ĉiuj pripensoj, oni ordonas novajn ŝparojn, tio nur estas klarigebla pro la mizera situacio, en kiu la lerneja k prisana administracioj troviĝas. La magistrata kasisto disponigas ĉiam pli k pli malmulte da mono por la lernejoj. La lernejestroj nun devas kalkuli, kiel mastrumi per etaj enspezoj. Unu drakona ŝparordono sekvas la alian.

Oni ne nur ŝparas pri la lernejaj infanoj ĝenerale, oni eĉ ŝparas pri la plej mizeraj inter ili, infanoj kun korpaj aŭ spiritaj difektoj, por kiuj oni kreis specialajn instituciojn. Ilin oni nun volas forigi. Oni ŝparas kontraŭ ĉiu bonkoreco k prudento, nur por aŭdi, ke oni devas ŝpari denove.

Instruanto.

La kresko de la lernejo en Sovetio.

Mizeriĝo de la lernejara stato en ĉiu burĝa lando. Kontraŭe al tio vigla kreskado k leviĝo de la Sovetia lernejo. Kelkajn nombrojn mi donas. Ili estas sekaj, sed klaraj k veraj. Por la lasta jaro de la unua kvinjarplano oni kalkulis la elspezojn por la lernejo je sumo de 1954 milionoj da rubloj. Por 1932 oni bezonas 2497 milionojn.

La lernejo estas dugrada laŭ aĝo. Por la unua grado oni antaŭvidas kreskon de 10 milionoj al $17\frac{1}{2}$ milionoj. Tamen en 1932 oni kreskos ĝis 20 mil. Plio de 14,6%. Por la dua grado (12–16 j.) oni antaŭvidis kreskon de 1 400 mil al 2 207 mil. Tamen oni atingos la nombron de 4 676 mil lernantoj. Plio de 111,8%.

Likvidonombro por analfabetoj dum la tuta kvinjarplano estis de 1,4 miliono al 5 milionoj. Tamen en 1932 oni atingos la nombron de 20 913 mil, do en la lasta jaro oni atingas la kvaroblon de la tuta plano. En Ukrainio la analfabeteco jam estas likvidita. La plena likvido de analfabeteco ĉe plenaĝuloj estas atingota. Nun la duonalfabeteco altiĝis je 57%. La likvido de tiu nun atingita grupo estas alcelata. Tial tiu kulturlaboro atingis pli altan gradon.

Fondataj estas dum 1932 3500 politeknikaj modellernejoj. Lenin skribis en 1913: „Por milo da loĝantoj estas 47 lernantoj, kiuj frekventas la lernejon. Tamen la nombro da junuloj, kiuj devas frekventi la lernejon, estas 22% el la tuta loĝantaro. Sed nur 4,7% vere vizitas la lernejon. Preskaŭ 4/5 el la rusaj infanoj k junuloj estas prirabataj de la instruado. La registara jarlibro mencias 21% el la loĝantaro kiel personojn, kiuj scipovas la legadon“.

Nun sub la sovetia registaro estas por 1000 loĝantoj 100 lernantoj k en 1932 estos 150. En 1931 estis 20 milionoj da lernantoj, trioble pli ol en 1913. Laŭ la direktivoj de Lenin, donitaj en 1922, estos levata la instruisto al nivelo, sur kiu li en burĝaj landoj ĝis nun neniam staris. Kaj se la burĝaj ŝtatoj daŭrigos mizerigi la instruistojn, post kelkaj jaroj Sovetio estos por multaj kap. ŝtatoj rilate la materian bazon de l'instruado belega ekzemplo.

Statistiko laŭ „IBA“ S. A.

Militismo en litovaj lernejoj.

En ĉiuj lernejoj, eĉ elementaj por buboj, regas forta militista k klerikala atmosfero. Ĉie pendas pafilo k bildo de Kristo sur la muroj. En ĉiu semajno estas aranĝataj 2–3 horoj por milita ekzercado kun armiloj. La gelernantoj ankaŭ konatiĝas kun ĉiuj branĉoj de la armeo: artilerio, infanterio, aviadilaro ktp. Dum majo, en ĉiuj lernejoj okazis manovroj, kiujn gvidis oficiroj de la regula armeo.

Antaŭ du jaroj ekzistis en ĉiuj litovaj lernejoj lernant-organizoj. Kelkaj el ili devenis el la unuaj tagoj de la nacia liberiĝo el cara reĝimo, kiel ekz. la socialrevolucia „Aŭŝrine“, kiu havis martirojn k persekutitojn el la cara kiel el la nuna faŝista epoko.

Nun en la lernejoj povas agi libere nur la skoltoj. *Vincas.*

La eklezio konkeras la Sudan Maron.

La eklezio laŭ la eldiroj de siaj nigraj sklavoj estas tre idealista, ĝi ne juĝas altvaloraj materiajn posedojn k batalas k kalumnias kontraŭ la materialistaj liberpensuloj en Holando, la eta artefarita lando, kiu formas eĉ solidan materion el la akvo. La eklezio estas kontraŭmaterialista duoblasence, ĉar ĝi ankaŭ metas la nigran manon sur la ĵus konkeritajn grundojn. En Holando ĝi ekhavis grandan financan povon per la lernejo k nove pritraktota leĝo plifortigos tiun tendencon.

Unu parto de la Suda maro jam estas sekigita k sur ĝi svarmas 150 infanoj, kiuj bezonas instruadon. La plej proksima komunumo devas fondi lernejon, sed ne faras tion, ĉar post kelka tempo la nova grundo estos forrabata de privatulo aŭ de la ŝtato. La ŝtata direkcio de la Sudmaraj laboroj trovis rimedon. Ĝi formis privatan lernejan asocion, kiu provizore prizorgos la in-

struadon. Ĉi lasta estos neŭtrala. Religia instruado okazos post la oficialaj lecionoj. En la estraro sidas du protestantoj k du katolikoj.

Kiu konas la holandan instruadon, tiu komprenos la danĝeran situacion. Do ĉi tie fondiĝis privata lernejo kreita de la ŝtato, do ŝtat-privata lernejo. Nova monstro leviĝinta el la Suda maro k kompreneble aprobita per ruzaj ministraj vortoj, kiuj defendas fondon k agon tute eksterleĝan k kontraŭ la spirito de la tielnomata „pacig"-instruado. Danĝera precedenco estas donita k la eklezio komprenos k eluzos tion. *S. A.*

Alvoko!

Kiu K-do kolego el Vieno povus priskribi la socialistan lernejon aŭ verki artikolon, en kiu li atakas la neŭtralan instruadon? Traduko de tia artikolo ankaŭ valoras. Mi preferas artikolon de profesiulo. *Aarse.*

RADIO-PROGRAMO:

Ni ricevis informon de la Radio-Servo Esperantista, ke la plej multaj stacioj dum la someraj monatoj ne dissendas esperantajn programojn. Provizore do ne aperos ĉi tiu rubriko, kiun ni ree enmetos, tuj kiam ni ricevos de la nomita Servo denove la informilon. — Red.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

La Paŝoj de la Jarkvino. Skizoj pri socialisma konstruado. Kunmetis *N. Potapĉik.* Centra Eldonejo de l'popoloj de USSR, Tutukrainia filio, Ĥarkovo. 1931. Form. 15×21. 112 pĝ. Prezo: 1 rbl. 25.

Tiu ĉi verko konsistas el 28 skizoj pri la laboroj efektivigataj sub la nomo de Kvinjara Plano en Sovetio, kiuj devas konduki al socialisma mastrumado. Pri la valoro de la skizoj povis fari al si bildon niaj legantoj, ĉar unu el la plej longaj estas represita en la 2-a n-o de „La N.E.". La ĥibro estas bele prezentita k klare presita (se ni esceptas diversajn preserarojn). La traduko estas zorge farita de K-doj Tomenko k Kolĉinski. Pri specialvortoj k kelkaj neologismoj sekvas klarigoj ĉe la fino de la libro. Ni bedaŭras la uzon de l'vorto „uzino" anst. *fabriko.*

Estas gratulinde, ke *ŝtata* eldonejo prenis sur sin la eldonon de tiu ĉi verko. *N. B.*

O. Levada: Sendiuloj ŝturmas Dnepron. Skizoj pri ateistaj ŝturmbrigadoj. Elukrainigis *V. Kolĉinski.* Ekrelo, Leipzig. 1931. — 14 pĝ. Form. 12×18. Prezo: 0.15 mk. g.

Ne pli ampleksa ol flugfolio, la broŝureto agitas por la batalo kontraŭ la religiuloj k montras ekzemplojn pri sukcesoj en tiu batalo en la Dnepra regiono de Sovetio. („Ŝturmi" havas la signifon de „impete ataki".)

La Krizo. Iom el la aktuala politiko. Ekrelo, Leipzig. 1932. Prezo: 0.15 mk. g. 23 pĝ. Form. 12×18½.

La broŝuro komentas la taktikon de la Kom. Internacio en la nuna tempo de la ekonomia krizo laŭ la tezoj de l'XI-a Plenkunsido de l'E.K. de Komintern. Laŭ ĝi nur la kap. mondo suferas pro la krizo, dum USSR „en ĉiu jaro reprenas evolurapidecon, egalan, preskaŭ al tiu de jardekoj de la kapitalisma evoluo." Pri interproletaj fratbataloj oni ne bezonas miri, se oni konsentas al tio, ke (p. 14) „socialdemokratio estas la plej aktiva faktoro k kondukanto de la faŝistigo en la kapitalismaj ŝtatoj..." La tradukinto erare trouzas „la" k aliflanke forlasas ofte la artikolon, kiam ĝi devus esti aplikata; p. 21: „kaŭzigi" anst. „kaŭzi". *N. B.*

P. Firu k S. Pragano: Rumana Bonhumoro en elektitaj rakontoj. Mendebla ĉe L. Moreau, Raapopscheweg 55, *Arnhem,* Nederl. Prezo: broŝ. 2 sv. fk., bind. 3 sv. fk. (inkl. afr.) 64 pĝ. Form. 12×18.

Jen 5 mallongaj rakontoj verkitaj en flua k facile komprenebla lingvo de rumanaj aŭtoroj. Oni legas ilin kun plezuro. La traduko estas klara k korekta. La ideala celo de l' kompilinto estas, per „interŝanĝado de literaturaj specimenoj" diverspopolaj atingi, ke „la pensaroj de l'popoloj interrilatiĝos k rezultigos pli da kompreno, pli da ŝato k malpli da suspekto k malamo." *N. B.*

Socialista Kantaro. Eld. ALLE-Wien k SEA-Frankfurt. Prezo 0.60 gr. 64 pĝ. Form. 11×15.

ALLE rezignis reeldoni sian ĝisnunan kantaron „Libera Voĉo" k SEA rezignis eldoni propran kantaron — k tiel estiĝis ĉi tiu kolekto da originaloj k tradukoj de batal- k popol-kantoj destinitaj al la kantemuloj inter la socialista esp-istaro germanlingva. Inter la kantoj estas sufiĉe multaj, kiuj ankoraŭ ne aperis en aliaj esp. kantaroj. Muziknotoj mankas, sed la melodioj estas konataj ĉe germanlingvanoj. La traduka lingvaĵo estas bona. *N. B.*

La konfliktoj en Manĉurio k Ŝanĥajo. Eld. Universala Homama Asocio, *Kameoka,* Kiotohu, Japanio. 1932. Prezo: 2 internac. resp. kuponoj. 50 pĝ. Form. 12 × 18 cm.

La unua parto de tiu ĉi broŝuro donas historian priskribon pri la okazintaĵoj en Manĉurio k Ŝanĥajo tute laŭ japana nacieca vidpunkto. La dua parto montras, kiel la „U. Homama Asocio" organizis helpagadon por iomete malpliigi la mizeron en la pro milito suferantaj regionoj. Karakterize: tiu Asocio partoprenis manifestacion *kontraŭ la forigo* de l'japana armeo el Manĉurio!

Esperanto Taalkursus (Lingva kurso) de *F. Faulhaber.* Eld. Nederl. Lab. Esp. Federacio, Valentijnkade 2, *Amsterdam-O.* Form. 13×21. Prezo de l'tuta kurso gld. 5 (gld. 3.50 por membroj de NFLE).

Kurso por holandlingvaj laboristoj aperanta en kajeroj 8-paĝaj laŭ 14-taga ritmo. Ĝis nun ni vidis la 2 unuajn lecionojn tre zorge k detaleme prilaboritajn. La tuto ampleksos 26 lecionojn.

Mnemonika Instituto de prof. D. Fajnŝtejn. *Vilno,* Zawalna n-o 15—11 (Polio). 16-paĝa senpaga prospekto pri metodo de memorfortigo trifoje premiita de la Pariza Akademio. En la prospekto troviĝas multaj juĝoj de aprobantoj al la metodo.

Aŭstrio. Plurkolora prospekto eldonita de Ministerio por Komerco k Trafiko, Vieno, 1932. Havebla senpage ĉe Intern. Esp. Muzeo, *Wien* I, Neue Burg. — Bela propagandilo por ekspozicioj ktp. kun tre preciza fervoja karto de Aŭstrio.

Cirkulero pri *Internacia Esperanto-Muzeo* (Wien I, Neue Burg, Heldenplatz), kun nomoj de l'honorkomitatanoj k alvoko donaci por la garantia kapitalo k alsendi materialon.

Kijo Cujuki: Ŝtala Biblio de Samurajismo *(Pri la japana glavo).* Eld. Japana Esperanto-Instituto, Tokio. 1932. — 22 pĝ. Form. 11×16. Prezo: 0.60 sv. fk.

Samurajismo estas speciala moralo de l' *samurajo,* kiel nomiĝas la japana kavaliro de l'feŭda epoko. La glavo estas la konkreta simbolo de tiu moralo. Pri ĝia historio k ĝiaj kvalitoj parolas (iom seke) ĉi tiu broŝureto.

Grava katastrofo en la Valencia Universitato. Ilustrita prospekto eldonita de *Valencia Esperanto-Grupo, Sangre 11, Valencia* (Hispan.), por alvoki al helpo per donacoj de mineraloj k fosilioj, kiuj per brulo de l'Universitato estis neniigitaj.

MEMORNOTO

Represis el „S-ulo":

Libera Socialisto, Zaandvort, 18. 5., Pri la Pariza Komuno (Lisagare); *The Los Angeles Citizen,* 27. 5., malvenko de tekslab. (387); *Industrial Worker,* Chicago, 14. 6., el Japanio (387); *Le Travailleur,* Belfort, 2. 7., impresoj el Jap. (387); *Der Funke,* Berlin 2. 7., Politika k ekonomia vivo en Latvio (390); *La Libre Pensée,* Paris, jun., el Svedio; *Le Flambeau,* jul., Brest, el Meksikio.

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Signalen, Stokholm, 2. 6., *Nederlanda Esperantisto,* junio; *The Labour Woman,* London julio; *L'Ami de la Nature,* Strasbg., jul/aŭg.

*

En „Young Worker" (Londono) komenciĝis en junio regule aperanta esp. kurso.

NIA POŜTO

17 418. — Via artikolo aperos.

KORESPONDADO

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Vilem Fromm, *Libeznice 128 u Prahy,* kĉl, interŝ. PM. Respondo garantiata.

GERMANIO

Mi volas interŝanĝi ŝakproblemojn kĉl. Gekdoj. Al kiuj solvas aŭ eĉ komponas ŝakproblemojn mi sendos senkoste germ. lab. ŝakgazeton. Skribu al: K-do P. Ph. Schmitt, Gaustr. 37/IV., *Bingen/Rh.*

K-do Hubert Cremer, Immengarten 40, *Hildesheim,* dez. vigle koresp. kĉl, L, PI, bfl. Ĉiam rapide resp.

Miaj lernantoj dez. koresp. kun Gek-doj el ĉ. landoj. Adr.: K. Fritz Goltermann, Eckampstrato 13, *Düsseldorf-Rath.*

HISPANIO

Proleta asocio dez. ĉiel koresp. kĉl. geproletoj. Resp. garantiata. Adr.: As-on Cultural (Esperant-Fako), P-o de Dabra y Puig 9, *Barcelona.*

JUGOSLAVIO

K-dino Ana Podlaha, *Ptuj,* kĉl, L, PI, pri virina emancipado.

K-dino Zinka Zuran, *Ptuj,* dankas al ĉ. sendintoj de belaj PI k L. Bedaŭre ŝi ne povas koresp. kun ĉ. Pardonu k paciencIĝu, gegrupanoj resp.

Esperantista Grupo „Libereco"

aranĝos esperantan ekspozicion por fari grandan propagandon inter niaj gelaboristoj. Ni petas ĉiujn Gek-dojn k esp. asociojn helpi al ni laŭpove, sendante al ni ĵurnalojn, revuojn, PK, PM ktp. — Kiel dankon ni sendos salutojn al ĉiuj helpemaj Gek-doj. Adr.: Zofimo F. Luz, Rua Francisco Jose Mota 10, *Setubal* (Portugalio).

ENHAVO

	paĝo
Raportaro de la Plenum-Komitato de SAT	207—210
Ŝtutgart en la Historio	208—209
Projekto pri nova Statuto de SAT	210—212
Proponoj al la XII-a Kongreso de SAT	212
Pri la organizformo de SAT	212—213
4-a Komuniko pri la XII-a Kongreso de SAT en Ŝtutgart	213—214
La klasbatalo tra la mondo	214
Sennaciula pedagogia paĝo	215—216
Recenzejo	216

Presejo Oscar Wettig, Gelnhausen (Germanio)